Lothar Zenetti,

# Ho, kie estas vi, Sinjor'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ho, kie estas vi, Sinjor',
al kiu ni preĝadas ?
Proksima estas vi kaj for,
vi ne ekkoniĝadas.

Ni serĉas vian bildon, Di',
ja estas ni blinduloj,
nepovas ie trovi vin,
ne vidas vin okuloj.

En la motor-bruad' ni vin
ne povas aŭdi ie,
vi grace iluminu nin,
perdiĝas ni alie.

Malplena estas la ĉiel',
armiloj estas ĉie,
ne estas ie plu anĝel',
ne regas paco ie.

Paŝtistoj jenaj nun al ni
ne estas plu konataj.
La Di-infanon montru vi,
ke estu ni savataj.

*Traduko de la Germana poemo "Wo bist du, Gott" de* Lothar Zenetti *(∗1926-02-06) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2004-12-06.*

*MR-500-01 / Arg-827-1662 (2013-02-15 18:32:16)*

*Pri la poeto vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Lothar_Zenetti`.